

04173	sakstacio	143	laŭ unusola propono
10280	alto de mallevita pantografo	143	laŭ nova propono
10281	pantografa levodistanco	143	laŭ propono 1
10283/12855	pantografa funkciadzono	143	laŭ propono 1
10286	pantografalto momenta	143	laŭ propono 2
04159	stacio traire disforka	144	laŭ unusola propono
04171	stacio konekse disforka	144	laŭ unusola propono
09250	ŝlosilinterrigla instalaĵo	144	laŭ propono 1
12690	relprofilo reduktado ĉe nadlorelkalkano	144	laŭ propono 1


\* laŭ unuanima prefero el retaj respondoj:  
08143 **signalo substitua por laŭvida veturo**

\* kiel sekvoj el decido pri 08068:

05837 **vagonaro ir-reira**  
10086 **varvagono ir-reira**

### Novaj taskoj

**Unue** temas pri artfika traceado de relvojoj en montaro, por primajstri necesan altecdiferencon. La bildo montras solvon kun daŭrigo de la origina direkto:



**00999** Trako konstruita en formo de helico.

bulgara	ж.п. линия спирално виеща	itala	tracciato elicoidale
ĉeĥa	šroubovitá smyčka	kroata	pužasta petlja
dana	vendespor	norvega	spiralkurve
franca	boucle hélicoïdale	pola	petlja serpentynnowej trasy torowej
germana	Kehrschleife	rumana	buclă elicoidală
hispana	lazo cerrado	slovena	spiralna zanka
hungara	szerpentin		

Pro la ĝisnuna Esperanto-termino „trakobuklo helicoida (montara)” ni konsultu la PIV-difinojn:

**buklo 2** Ringoforme kurbigita fadeno, rubando, ŝnuro.

**helico 2** Kurbo de ŝraŭbkanelo.

**helicoido** Surfaco generita de rekto, kiu moviĝas tiel, ke ĉiu punkto trairas helicon kun donita akso.

Estas klare, ke „helicoid-” ne taŭgas, ĉar temas pri areo. Mi proponas pripensi jenajn terminŝanĝojn, eventuale kun alia kombino:

**1) trakobuklo helica (montara)**


**2) relvojhelico (montara)**

La bulgara, norvega kaj slovena terminoj enhavas „spiral-”. Jen la PIV-difino:

**spiralo 1** Ebena kurbo, kiu pli kaj pli malproksimiĝas de sia deira centra punkto, rondirante ĉirkaŭ ĝi. Sekve tiu termino ne taŭgas. Vere spiralforme la skizita unika fervojlinio atingas la monton *Brocken* en Harco:



**Due** koncernas solvon por retroveturo, tipe ĉe tramvojo, sed tre malmulte ankaŭ ĉe fervojo. La bildo montras ekzemplon:



**07183** Trako deflankiĝa en trakaro, kiu poste denove atingas la deirajn trakojn.

ĉeĥa	kolejová smyčka	itala	giorne
dana	vendespor	kroata	kolosiječna petlja
franca	raquette	norvega	vendespor
germana	Kehre	pola	petlja obrotowa
hispana	via en raqueta	rumana	linie de evitare
hungara	hurokvágány	slovena	tirna zanka

La ĝisnuna Esperanto-termino „trakĝirejo harpingla” ne bone taŭgas pro la PIV-difino **ĝiri 3** Ŝanĝi la direkton de veturilo.


kaj pro tio, ke fervojaj trakradiusoj – kontraste al eblaj ŝoseradiusoj – devas esti tro grandaj kompare kun harpinglo. Jen du ŝanĝproponoj, eventuale kun alia kombino:

**1) trakobuklo returna**

**2) trakmaŝo por retroveturo**

PIV klarigas: **maŝo 1** Ĉiu el la nodoj, kiujn formas ... fadenoj ... en reto.  
**maŝo 2** Ĉiu el la aperturoj, kiujn tiuj nodoj lasas inter si.

**Trie** la novaj taskoj temas pri trako por distribui vagonojn al aliaj trakoj laŭ jena bildo:



Kvankam por nocio 08835 mankas difino, laŭ la nacilingvaj terminoj evidente temas pri tia trako.

**08835** (sen difino)

bulgara	коловоз за маневрено изтегляне	hungara	kihúzóvágány
ĉeĥa	výtažná kolej	itala	tronchino di sicurezza
dana	udtræksspor	kroata	izvlačni kolosijek
franca	voie de tiroir	norvega	uttrekksspor
germana	Ausziegleis	pola	tor wyciągowy
hispana	via de distribución	rumana	linie de garare sau manevră
		slovena	izvlečni tir

La ĝisnuna Esperanto-termino estas „trako tirmanovra”, kvankam tiea manovrado okazas alterne tire kaj puŝade.

Problema estas nocio 09749. UIC-difinoj ekzistas nur en kroata kaj slovena lingvoj, kaj sole la kroata difino mencias priservon de klienta (nome industria) trako. Ankaŭ la germana termino rilatas al tio. La slovena difino estas pli ĝenerala.

**09749** Trako por distribui vagonojn al trakaro kaj tiel priservi klientajn trakojn.

bulgara	<i>присъединителен коловоз</i>	itala	<i>binario di raccordo</i>
ĉeĥa	<i>připojná kolej</i>	kroata	<i>prilazni kolosijek</i>
dana	<i>tilslutningsspor</i>	norvega	<i>tilstillingspor</i>
franca	<i>voie de desserte</i>	pola	<i>tor bocznicy</i>
germana	<i>Bedienungsgleis</i>	rumana	<i>linie de garare</i>
hispana	<i>via que sirve a algún a instalación</i>	slovena	<i>izvlečni tir za tirno skupino</i>
hungara	<i>kiszolgáló vágány</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino „trako klienta” (korekto de antaŭa „trako aliĝa”) certe ne ĝustas. Mi petas respondi, kion esprimas via nacilingva termino, precipe kiun diferencon al 08835 (fine de la antaŭa paĝo).

Provizore mi proponas doni la difinon sen la etlitera parto al nocio **08835** kun la termino:

**trako distribua**

Sekve nocio **09749** havu la kompletan difinon kaj la terminon:  
**trako distribua klientpriserva**

Haŝon ĉe nacilingvaj terminoj havas nocio 09742, ĉar pluraj terminoj rilatas ankaŭ al distribuado, aliaj al parkado:

**09742** (sen difino)

bulgara	<i>разпределителен коловоз</i>	itala	<i>binario di scomposizione</i>
ĉeĥa	<i>odstavná kolej</i>	kroata	<i>kolosijek za rastavljanje vlakova</i>
dana	<i>henstillingsspor</i>	norvega	<i>greinspor</i>
franca	<i>voie de débranchement</i>	pola	<i>tor odstawczy</i>
germana	<i>Zerlegegleis</i>	rumana	<i>linie de desfacere</i>
hispana	<i>via de descomposición</i>	slovena	<i>tir za razformiranje vlaka</i>
hungara	<i>vonatfelosztó vágány</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino estas „trako disranĝada”. Ankaŭ tiukaze mi petas, laŭ esprimo de via nacilingva termino diri vian opinion. Eventuale ni konstati, ke parkadkoncernaj terminoj malĝustas, kaj temas pri distribua trako en ranĝadstacio. Restas du terminproponoj:

- 1) **trako disranĝada** (kiel ĝis nun)
- 2) **trako distribua ranĝadstacia**

Anticipe dankante deziras agrablan postsomeran tempon Heinz Hoffmann.

## Terminara Kuriero

TeKu 145

Aŭgusto 2012

### Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablenail.de

**Karaj gekolegoj,**  
el trakto de nocioj rezultis jenaj

#### RailLexic-termindecidoj:

* laŭ du fakaj kunsidoj de 64-a IFEF-kongreso	TeKu:
05442 <b>trakcio lokomotiva-stirvagona</b>	142 laŭ propono 2
05572 <b>navedulo</b>	142 laŭ propono 1
05573 <b>trafiko navedula</b>	142 laŭ propono 1
07134 <b>motorvagonaro ambaŭkape</b>	
	142 laŭ propono 1
08068 <b>kondukebla</b>	
	142 laŭ nova propono sendita de Heinz-Diedrich Hartig
08974 <b>vagonartrafiko ir-reira</b>	142 laŭ propono 1
09047/09165 <b>trafiko laboristara</b>	
	142 laŭ propono 2
09075/09136 <b>trajnkompleto lokomotiva-stirvagona</b>	142 laŭ propono 1
09153 <b>trajno laboristara</b>	142 laŭ propono 1
	142 laŭ propono 1
	<b>pasaĝervagonaro plurtrajna</b>

Du 125-jaraj  
jubileoj -  
de Harcaj  
Eŝpuraj Fervojoj  
kaj de Esperanto

